Lapfermilo

Lapfermilo, ŝirfermilo aŭ krocnilona fermilo estas fermilo aŭ ligo kiu povas esti malfiksata, inter aliaj uzata en vestaĵoj.

Lapfermilo estas eltrovaĵo de la sviso Georges de Mestral. Li havis la ideon en 1941, post kiam li miris kiel malfacile li povis forigi lapojn el siaj vestoj kaj el la felo de sia hundo, kiuj tie amasiĝis dum la taga promenado. Li malkovris ke lapoj estas kovritaj de etaj krociloj, per kiuj ili alkrociĝis al la vesto kaj felo. De Mestral vidis la eblecojn kaj disvolvas - per multe da tempo kaj peno - la fermilon kaj patentigis ĝin en 1951 en Svislando. Patentoj en diversaj aliaj landoj sekvis, inter kiuj en 1955 en Usono.

De Mestral nomis sian eltrovaĵon Velcro, kunfandiĝo de la francaj vortoj *velours* (veluro) kaj *crochet* (krocileto). La markonomo Velcro estas en la plejmulto de la landoj registrita fabrikmarko kaj en multaj lingvoj, inter kiuj la angla, la franca kaj la flandra, lapfermilo estas nur konata sub tiu nomo. En aliaj lingvoj, kiel la nederlanda, la gemana kaj la sveda, kontraŭe la ĝenerala termino estas uzata (respektive *klittenband*, *Klettverschluss* kaj *kardborreband*).

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Lapfermilo